# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



N-ro 20 - OKTBRO - NOVBRO - DECBRO - 1993

# Kajeroj — el la Sudo

Fondita en 1988.

## BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: Martín Bustin Benito
Nuevas Lomas, sec. 2, part. 13, bloq. 1,P-7, 2-A
03015-ALICANTE. (Hispanio)
*****
Sekretario: Jesus de las Heras Giménez
Av. Juan Carlos I, 24, 2/G, Edif. Nueva Ronda, 1
30008-MURCIA.
*****
Kasisto: Nicolas GIL Carballo
Apartado 305, 24080-LEON.
Envios de cotizaciones sin coste adicional a nombre del mismo, desde cualquier punto postal de España, a la Cartilla Postal nº 29-85.039.477.

Redaktoroj de la bulteno:

Antonio Marco Botella
Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º.C.
50002-Zaragoza. (Hispanio)
***
Miguel Fernández Martín
C/ Santa Genoveva, 58. 6º C.
28017-Madrid. (Hispanio).


Kovrilo: Haveneniro kaj placo de Malago, urbo kie venontjare okazos la Ĝenerala Kunveno de HALE.

Enhavo:

Miaj impresoj pri la SAT-kongreso . . . . . . . . . . . 3/4/5 pĝ.
Bonvolu ridi...sed ne tro! . . . . . . . . . . . . . 6/7 "
La s-ro Marco Botella, kiu ne laciĝas . . . . . . . 8/9/10/11 "
Kaj...mi ne laciĝas . . . . . . . . . . . . . . 12/13 "
Priekologiaj zorgoj . . . . . . . . . . . . . . 14/15 "
Ekologio (poemeto) . . . . . . . . . . . . . . 16 "
Kiel KABE konfuziĝis pri la uzo de "de" kaj "per" . . 17/18 "
Kotiztabelo por 1994 . . . . . . . . . . . . . . 19 "
La Movado en kaj ekster Iberio . . . . . . . . . . 20/21 "
Rakontoj en unu minuto . . . . . . . . . . . . . 22 "
Administra angulo . . . . . . . . . . . . . . . 23 "

NOTO: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

# Miaj impresoj pri la Sat-Kongreso



*Unuafoje SAT-kongreso okazis en Bulgario. La kongresurbo situas en Kazanlak (Roza Valo), loko kiu prenis tiun nomon, ĉar tie, ĉe la valo de rivero Toundja, inter la montaroj Prednagora kaj Staraplanina, komenciĝis je la fino de la 18a jarcento la kulturado de rozoj. De tiam, fabrikado kaj eksportado de roza parfumo kaj roza oleo fariĝis kutima aktivado de tiu regiono. Tiel naskiĝis tiu poezia nomo Kazanlak (Roza Valo).*

*Partoprenis la kongreson ĉ. 250 gekongresanoj, grandparte el ili venintaj el Orient-Eŭropaj landoj, kiuj trovis seriozajn malfacilojn por atingi la kongresurbon, ĉar survoje al ĝi, en Rumanio, transport-striko paralizigis ĉiajn veturilojn. Tial multaj kongresanoj ne alvenis ĝustatempe je la komenco de la kongreso.*

*Nur du hispanoj partoprenis la kongreson: la alta kosto de tiaj longaj vojaĝoj kulpas sendube pri tiu ne abunda reprezento de niaj samlandanoj.*

*La kongresmalfermo disvolviĝis tiel rutine kiel kutime. La laborkunsidoj estis speciale interesaj, sed mi ne povas, reprodukti aŭ komenti ilin, ĉar evidente ke nia bulteno ne disponas la sufiĉan spacon por tio. Cetere ĉiu SAT-ano povos legi detale tiun raporton en nia organo "Sennaciulo".*

*Deklaracio kaj Gvidrezolucio ŝajnas oportunaj reagoj de la kongreso al la nunaj aktualaj problemoj, ĉu de la politiko en la mondo, ĉu de la internaj problemoj, kiujn vivas nia asocio respektive. Tiurilate, estus dezirinda, ke "tiu repri-*

*pensado de la Gotemburga konvencio" ne estu distra piroteknikaĵo celanta forgesigi la temon, kiel jam okazis en pasintaj jaroj. Tamen, speciale trafa mi konsideras la paragrafon indikantan: "Konsilas al LEA-oj maksimuman adapton al lokaj cirkonstancoj, ĉefe tie, kie ekzistas plurlingvaj ŝtatoj aŭ plurŝtataj lingvoj". Paragrafon, kiu devus anstataŭi, jam, tiun konatan kiel "lingvioj" (esprimo, kiu kaŝas novimperiismajn resonojn tute netolerebla en SAT-medio).*

*Estis multnombraj la fak-kunvenoj: naturisma, liberpensula, liberecana, vegetarana, sindikatisma, pacisma, ekologiisma, sennaciisma ktp. En tiuj, kiujn mi partoprenis, mi konstatis la bonan laboron plenumatan per tiuj fakoj.*

*Malgraŭ tiu densa laborado ankoraŭ restis libera tempo por amuzaj vesperoj kaj interesaj ekskursoj: Koncerto de esperanta kanzonistino Nikolino kaj teatraĵo "Mi ne plu konas vin", prezentita de Bulgara Esperanto-Teatro, multe plaĉis al la kongresanaro. Sed tute specialan mencion meritas, miaopinie, la Bulgaraj Folkloraj Grupoj, kies kanto, danco kaj muziko, tipaj kaj popularaj, kun rimarkinda influo turka, estis vera regalo por ni. Ja tiu riĉa eksplodo de popolkostumaj koloroj kaj ĉarmaj harmoniaj sonoj konkeris ĉies korojn...*

*Dum la tuttaga ekskurso ni vizitis Veliko-Tarnovon, mezepokan bulgaran ĉefurbon, kies antikva parto, iam ĉirkaŭita per remparoj, el kiuj pecoj ankoraŭ restas, komplezis la scivolemulojn sopirantajn pri historio kaj antikvaĵoj. Duontaga ekskurso al la monto Ŝipka, ankaŭ interesa sub vidpunkto historia, ĉar ĝi koncernas la liberiĝon de tiu lando el la jugo turka, taŭgis tre bone kiel distraj horoj post la intensa tasko. Mi miris pri ekzisto de tiom abundaj monaĥejoj, preĝejoj kaj armeo-muzeoj, kio inklinas nin pensi pri tro da influo de Religio kaj Armeo sur tiu socio.*

*Postkongresa semajno okazis ĉe Nigra Maro, kie ni palpis saman turisman etoson kiel tiu de Okcidento: invado de germanaj turistoj kaj la indiĝenoj, kiuj ellerninte la merkatan leĝon, metas la produktojn je astronomiaj prezoj.*

*Speciale rimarkindaj, la frateca etoso reganta inter kongresanoj kaj ankaŭ la simpatio kaj gastameco de la bulgara popolo. Venontjare, la 67a SAT-kongreso okazos en la moravia*

*urbo Straznice (Ĉeña Respubliko), kie ni dezirus, ke malgraŭ la krizo ekonomia kiu dronigas nin, pli da hispanaj SAT-membroj partoprenu tiun kongreson. Ĝis la venonta!*

*Martín Bustín Benito*

*****

*<u>DEKLARACIO DE LA 66a SAT-KONGRESO:</u>*

*La 66a kongreso de SAT okazinta en Kazanlak (Bulgario), de la 14a ĝis la 21a de aŭgusto 1993 kun la partopreno de 250 esperantistoj el pluraj kontinentoj*

*<u>KONSTATAS</u>, ke la politikaj ŝanĝoj okazintaj en la mondo de kelkaj jaroj ne realigis la SAT-idealon de socia justeco, kaj, ke konsekvence plu devas ekzisti asocio, kiu kunigu la esperantistojn, kiuj sin vivtenas per sia laboro fizika aŭ intelekta.*

*<u>ASERTAS</u>, ke la diverseco de la etnaj lingvoj kaj kutimoj devas esti fonto de kultura pliriĉigo de la tuta homaro, ne preteksto uzata de ŝtatestroj kaj ceteraj politikistoj por praktiki aŭ rekomendi diskriminojn, perfortaĵojn kaj militojn.*

*<u>REMEMORIGAS</u>, ke al la propra kulturo de Esperanto apartenas la alvoko de Zamenhof distingi inter la konceptoj pri "landoj" kaj "gentoj".*

*<u>ATENTIGAS</u>, ke la universala deklaracio pri homaj rajtoj konsistigas nedisigeble aplikendan tuton.*

*****

*GVIDREZOLUCIO*

*La 66a kongreso de SAT:*

*<u>ĜOJAS</u>, pri la projekto krei LEA-on "SAT-Balkanio"-n.*

*<u>ALVOKAS</u> al repripensado de la Gotemburga konvencio.*

*<u>KONSILAS</u> al LEA-oj maksimuman adapton al lokaj cirkonstancoj, ĉefe tie, kie ekzistas plurlingvaj ŝtatoj aŭ plurŝtataj lingvoj.*

*<u>KONTENTAS</u> pri bonaj rilatoj inter SAT kaj aliaj E-asocioj.*

*<u>KONSILAS</u> al la redakta komitato de "Sennaciulo" organizi debaton pri virinaj aferoj.*

*<u>PETAS</u>, ke ĉiu SAT-ano helpu la novan skipon de SAT-JF.*

*****



# BONVOLU RIDI... SED NE TRO!

*Mallerta edzo.*

Paro da ĵusaj geedzoj ellitiĝas frumatene post la nupta nokto. La edzino, ordonema kaj iomete kolera, diras al la edzo:

-Karulo, bonvolu pretigi la kafon! Kaj...restinte iom pensema, ŝi aldonas iom severe:

-Aŭ ankaŭ ne tion vi scias fari!

***

En lando sub diktatora reĝimo.

Foje, en certa lando regata de diktatoro, la observatoriaj astronomoj registris sismajn skuojn, kies epicentro kuŝis sur malproksima regiono de la lando. Tuje, oni sendis informan komunikajon al la Provincestro, kiu siavice telegrafis al la koncerna urbeto jene: "Sisma movado okazontaj ĉe via urbo. Mi scias epicentro situas en via urbeto. Zorgu energie kaj evitu mortigadojn".

Du tagojn poste, la Provincestro ricevis de la urbestro ĉi tiun telegramon:

"Sisma movado abortigita. Epicentro kaj tri aliaj ulaĉoj arestitaj".

*****

Nokta aventuro.

Du grimpistoj piedirantaj dum la tuta tago en la montaro venis vespere en vilaĝan gastejon. Ĉar ili estis lacegaj, ili eĉ ne vespermanĝis, sed luis ĉambron kaj iris tuj dormi. Kiam la lampo estis estingita, ili konstatis, ke la aero en la ĉambro estis tiel sufoka, ke neniu el ili povas ekdormi.

-Kie estas la alumetoj? -demandis Johano.
-Mi havas neniajn -respondis Georgo.
-Mi nenion vidas, sed malgraŭ tio mi iras malfermi la fenestron -diris Johano.

Li ellitiĝis kaj blinde-palpe iris tra la ĉambro. Post momento li venis al granda vitra tabulo kaj ekkriis:

-Mi jam trovis ĝin, sed ne povas ĝin malfermi.

-Do, rompu ĝin! rediris Georgo.

Johano prenis sian ŝuon kaj jam aùdiĝis tra la ĉambro la sono de falantaj vitropecoj.

-Nun estos bone- diris li kaj revenis en sian liton.

-Certe -diris Georgo-. Oni ja eĉ ne povas dormi sen aer-renoviĝo. Kaj ili ambaù profunde endormiĝis.

Sed imagu, kia estis ilia surprizo, kiam ili matene vekiĝis kaj vidis, ke la fenestro estas netuŝita, sed la vitra pordo de granda libroŝranko estas frakasita.

*****

Ĉe instruistoj.

-Mi donis al tiu lernanto malsukcesan noton; li eĉ ne scias, kie estas Malvinoj!

La alia: -Tre bone farite, tiel li penos memori, kie li lasas ĉiun aĵon!

*****

En lernejo.

La instruisto: -Kiu skribis sur la nigran tabulon: "La instruisto estas idioto?"

Lernanto: (Timeme) -Estas mi.

La instruisto: -Bone, ĉi tiun fojon mi pardonas vin pro tio, ke vi sincere diris la veron.

*****

Vere ebria.

Ebriulo eliras el drinkejo tiel ebria, ke li ne scias, kie li troviĝas. Zigzage li alproksimiĝas al urbogardisto kaj demandas lin: Ĉu vi volas diri al mi, kie ni estas?

-En strato xxx proksima al la placo xx -respondas la gardisto.

Kolere la ebriulo replikas: -forgesu la detalojn, sinjoro, bònvolu diri al mi, en kiu urbo ni estas!

*****

Ho, se ili geedziĝus!

Preleganto: -...imagu, ke blato kapablas naski 43.000 idojn nur en unu sola jaro.

Unu el la aùskultantoj: -Dio mia!, estus ja terure, se tiuj estaĵoj geedziĝus!

# La s-ro Marco Botella, kiu ne laciĝas...

Ni, eŭskaj naciistoj -aŭ *abertzaleak*(*), por ke skandaliĝu kelkaj- estas jam alkutimiĝintaj digesti ĉiuspecajn komplimentojn koncerne nian reakcian, etburĝan, foje sovaĝan kaj kontraŭaktualan idearon. Feliĉe, mi ankoraŭ ne perdis la humurkapablon kaj ĉiam pli amuziĝas legante tiujn skurĝojn, kiujn de tempo al tempo oni lanĉas kontraŭ ni el ne malmultaj flankoj. La pasintaj du numeroj de KAJEROJ EL LA SUDO ĵus havigis al mi po unu sukan specimenon, el la mano de s-ro Marco Botella.

Laŭ li, el la duobla vizaĝo, kiun montras naciismo (la manifiea vinjeto Ruĝa Ĉapeto(?)-kruela lupo meritas poenton!) nur akcepteblas -ĉar ne noca- tiu profilo, kiu ne endanĝerigas la aktualan *statu quo*. Naciismo, dum ĝi limiĝas al mistikeca glorado de la paseo, flegado de folkloro aŭ dancoj, kaj kulturado de certaj distingaj trajtoj, kiel lingvo kaj tradicioj, nedanĝeras. Sed ekde la momento, kiam ĝi elpaŝas kaj kuraĝas postuli kion ĉiu popolo, simple pro la fakto, ke ĝi estas tio, rajtas -nome: suverenecon- tiam ĝi estas tuj anatemita kaj kondamnita al la plej funda ĉelo en Tartaro.

Ŝajnas al mi, ke s-ro Marco Botella deiras el erara starpunkto, kiel estas kontraŭmeto de individuaj kaj grupaj (komunumaj, popolaj...) rajtoj. Kaj tio ja estas grava eraro. La homo en la mondo ne povas ekzisti sola; ĝi por ezkemplo apartenas nature al iu familio, kie ĝi naskiĝis kaj edukiĝis. Sed ĝi ankaŭ apartenas -ĉu pro iu konscia memdecido aŭ pro iuspeco de neelturniĝebla fataleco; ja neniu rajtas plendecidi pri si mem- al alia pli ampleksa (kvankam foje minoritata) komunumo. Komunumo kun similaj trajtoj -historiaj, kulturaj kaj sekve lingvaj- kaj kiu ofte disponas propran teritorion. Jes, ja: individuoj mem inter si profunde malsimilas; sed tamen ĉiu ricevas la impreson aparteni al iu tuto, havas komunajn aspirojn, sentas sin solidara kun la aliaj, siaj apuduloj. Tiu sinteno montriĝis **klare supertempa, klassendependa** kaj ĉiam latenta en la historia memoro de unueca grupo. Ni povas nomi tiun grupon nacio, etno, popolo aŭ iel ajn. Certe mi ne malkovris mediteraneon, sed mi simple celas al jeno: **la individuo kaj la grupo iris ĉiam kunligitaj, la konkero de iliaj rajtoj ĉiam estis komplementaj, aŭ se oni preferas, paralelaj**. Kio tamen ja ne signifas, ke unuopulo -pli nuda kaj sendefenda antaŭ la trouzoj de iu ajn pova instanco- ne devas esti speciale vartata de leĝoj. Cetere, la individuo tre baldaŭ spertis, ke kunligite kun aliaj samideanoj -kaj ne sola- ĝia kontesto pli efikas.

Kaj oni bonvolu ne mistifiki pri fantazia tutmondeco -eĉ imaga eŭropa naciecol- aŭ kosmopolitismo -rigardata kiel rezigno pri la partikulareco favore al iu pli uni-

* * *

(*)*abertzaleak*: en la eŭska laŭlitere "patrioto", sed ĝia vera senco pli proksimas al "naciisto". Ĝi estas kutime uzata en la hispanaj amaskomunikiloj kiel sinonimo de "perfortulo" aŭ "teroristo".

versala pravigo neniiganta ĉiun diferencon. Tiom pli malfacilas koncepti iun utopian tutkontinentan laboristan kolektivon, kiu ebligu kontraŭbatali la multnaciajn kapitalismajn entreprenojn, kiel proponas kun la impeto de 18-jarulo s-ro Marco. Tio ja kongruas kun la konata frazo de Marx en lia frua etapo: "La proletaro ne havas patrujon..." Kiom ajn prava montriĝis la marksa kritiko al kapitalismo, ĝi skandale lamas rilate al ĉi tiuj temoj. Oni asertis multfoje, ke super la rajto je memdispono de la popoloj situas la rajtoj de la proletaro kaj, ke la klasinteresoj diktos laŭkaze kiel solvi eventualajn konfliktojn devenajn de la apliko de la memdispona rajto. Tiu sinteno ŝajnas nepravigebla kaj simpliga; laŭ ĝi, la proletaro estus vere internacia, dum ĉiuj aliaj partikularaĵoj - kiuj kvazaŭ forvaporiĝus pro iu mistera Fatalo post la venko socialista- respondus al iu difinita fazo en la disvolviĝo de la burĝa ŝtato. Ĉi tiuj kriplaj analizoj evidentigas iaspecan dogmecon kaj absolutigemon; efektive ili neglektas pli fundan antropologian trastudadon, sen kiu neeblas fari al oni iun taŭgan ideon pri la homo kaj pri la interkulturaj rilatoj.

Mi persone pli emas paroli pri solidara internacieco: jes, mi ŝatas diversigi, ne homogenigi! Kaj tiu sinteno konsistigas neniun kontraŭdiron; efektive sana naciismo kondukas nature al internaciismo. Mi pruntos nun kelkajn vortojn de Javier Sadaba por subteni tiun tezon: *"...la homo ne rigardas sin kiel metafizikan realaĵon, sed ĝi renkontas en si mem konscienco-enhavojn. Sed kiuj estas ĉi enhavoj? simple la rilatoj kun la aliaj homoj, kun la cetero de la mondo. Kiam mi serĉas min, mi ne ekzistas, sed ekzistas la aliaj. Nu, io simila okazas koncerne naciismon. Kiam la problemoj de mia popolo interesas min, mi renkontas la identecon de tiu popolo, kiu estas nenio alia ol la respondo, kiu donas tiu popolo al la problemoj de ĉiuj popoloj en la mondo. (...) Jen la plej revolucia esenco de naciismo. Nome: unuiĝi en la diferenco. Mi ne plikonfirmas min neante la aliulon, sed mi vidas lin kiel plian eblecon. Eĉ pli: se oni ne permesas al la aliaj vivi iliajn eblecojn, mi tuj sentas min vundita..."*

Ofte oni preteratentas la enormajn eblecojn, kiujn havigas nacia konscienco por dinamismigi socion kaj efektivigi ŝanĝojn sur ĝi. Estas konate, ke multfoje kulture kaj socie riĉaj periodoj koincidas kun nacia renaskiĝo aŭ restaŭrado. Sed ne nur. Mi pli celas al la grandega revolucia ŝarĝo, kiun mem kunportas ĉiu lukto por nacia liberigado, kaj pri kio jam konsciiĝis delonge multnombraj socialismaj teoriistoj. Kvankam tiuj ĉi konsideroj povas venigi en la kapon de oni postkoloniismajn procesojn kadre de la tn. Tria Mondo, ĉefe post la Dua Mondmilito, ili ankaŭ tute plene validas nun kaj ĉi tie.

Mi certe ne troigas, se mi diras, ke la Eŭska Revolucia Movado por la Nacia Liberigo konsistigas unu el la plej originalaj, daŭraj kaj atentindaj fenomenoj (en sia speco) el Eŭropo dum la lastaj jardekoj. Kaj ne nur pro la fakto, ke ĝi baldaŭ socie enradikiĝis kaj ankoraŭ nun ĝuas tre konsiderindan popo-

lan apogon: ĝia ĉefa kontribuo kuŝas sur tio, ke ĝi scipovis, deirinte el la Sabinisma reakcia heredaĵo, krei tute novan koncepton pri eŭska nacieco, pli revolucian kaj progreseman, kaj malfermitan al multnombraj sektoroj de la eŭska socio, inkluzive de la enmigrintoj. Kaj kio plej gravas nun por ni: **la batalo por la nacia liberigo estis rigardata unuafoje kiel parto de la internacia proleta revolucio**, kiel atestas la suba peco, atribuita al Txabi Etxebarrieta: *"... la proleta internaciismo estas la batalo por la liberigo de ĉiuj subpremataj popoloj, kaj estas ankaŭ la praktika kunhelpo inter ĉiuj popoloj de la mondo por alveni al egaleca kaj harmonia disvolviĝo inter ĉiuj popoloj kaj ĉiuj homoj. En nia konkreta kazo eŭska naciismo estas objektive revolucia, kaj ĝia lukto estas kontribuo al la proleta internaciismo".*

Evidente tiu ĉi teksto -kiu datumas de 1967- rimarkeble maljuniĝis kaj neeblas nun laŭlitere ĝin apliki. Tamen ĝi bonege spegulas la sintenon de tuta generacio de eŭskaj naciistoj, kiuj scipovis rigardi de pli supre kaj provizis nin per ideologiaj bazo kaj iloj, sur kiuj plu labori kaj disvolvi novajn fruktodonajn ideojn. Malgraŭ mia relativa juneco -mi nun fanfaronas kiel decas al sana bilbaoano!- mi ankoraŭ memoras pri la multegaj solidaraj alvokoj kaj kuraĝigoj de hispanaj kamaradoj (anarkiistoj, socialistoj ktp...), kiuj dum la 80aj jaroj preskaŭ ĉiutage aperis en iu eŭska ĵurnalo. Ĉar post la frustracio, kiun lasis la transirado ĉe multaj homoj, Eŭskio profiliĝis kiel la sola ŝanĝa kaj esperiga ŝanco en la ĉiam pli inerta kaj apatia hispana panoramo; ĝia liberiga lukto estis ĵaluze rigardata kiel imitinda modelo kaj fonto de inspiro.

Certe ne ĉio disvolviĝis glate: onidire en Eŭskio ĉiutage naskiĝis spontanee dekoj da revoluciaj praktikoj, dum malestis eĉ unu kunordiga kaj korpiga teorio! Ĉu tiu ĉi kritiko pravas, ĉu ne, la sukcesoj ja ne estis okulfrapaj. Tamen la flamo tute ne estingiĝis, malgraŭ la obstino de la plejmulto el la amaskomunikiloj, pli kaj pli submetataj al la kontrolo de la hispana registaro, kaj de certaj eŭskaj politikistoj. Ĉi lastaj estas fariseoj, kiuj vendis sian popolon proprainterese, sed kiuj ne ĝenas sin nomi *abertzaleak*; ili estas kvazaŭ bone dresitaj hundetoj, al kiuj oni oferas sukerpecon kaj, kiuj dankeme svingas la vosteton...

Tamen ankoraŭ preskaŭ 20 procentoj de la eŭska socio (krom aliaj 50 procentoj, kiuj simple postulas memstarecon) pledas por totala rompiĝo disde la aktuala ĵur-politika kadro, senhezite abomenas monarkion kaj plu posedas envindan reago-kapablon antaŭ la multnombraj trouzoj fare de la povo. Mi kuraĝas diri, ke tiu trajto faras el Eŭskio unikan kazon en okcidenta Eŭropo. Kaj simple pro tiu fakto, ĝi ja meritus, anstataŭ suspektojn kaj akrajn cenzurojn, apogon kaj solidaron de ĉiuj hispanaj progresemaj laboristoj, kiuj aspiras al pli justa kaj egaleca socio. Jam estas la tempo ĉesi vidi en ĉiu stratangulo "sangosoifantajn naciistojn".

Nun iĝas prioritato la agnoski-

go de la rajto je memdispono. Mi certas, ke ne estas malmultaj la progresemaj hispanaj homoj, kiuj ne povas eviti tremeton aŭdinte tiun vorton. Necesas tuj forigi tiujn reakciajn antaŭjuĝojn. Se iu unueca komunumo aŭ nacio decidas propravole sin apartigi de iu ŝtato kaj konsistigi alian novan - kvankam evidente, ne devas nepre rezulti tio el la apliko de tiu rajto; ekzistas ja multaj aliaj eblecoj- **ne ekzistas racia argumento, kiu kontraŭstaru tiun libervolan decidon**. Ili mem, civitanoj de tiu popolo, estas plene suverenaj sin regi kiel al ili plaĉas, sen iun ajn ekstera enmiksiĝo. Cetere **la sola ekzisto de aliaj ŝtatoj -kiom ajn malperfektaj, mankaj kaj eĉ submetemaj ili estas- aŭtomate pravigas estiĝon de aliaj novaj**.

Eŭska maldekstra naciismo daŭre evoluas kaj mi ankoraŭ kredas je ĝia kapablo -ĉiam atentante la ĉirkaŭan senĉese ŝanĝiĝantan mondon- adaptiĝi al la novaj postuloj kaj eltiri la necesajn konsekvencojn. Eble jam alvenis la tempo modifi ne plu taŭgajn strategiojn, forigi kelkajn inerciojn kaj agadmetodojn. Sed ni devas ne forgesi, ke la konflikto Eŭskio-Hispanio (kaj mi parolas pri la konflikto en ĝia tuteco, ne nur pri ĝiaj plej akraj esprimoj) estas dudirekta; do necesas duflanka bonvolo se oni deziras ĝin solvi sen kovi frustraciojn, kiuj povus poste renaskiĝi kun pli bedaŭrindaj sekvoj.

Kuŝas ja daŭre en nia kapo la bildoj pri la tragedio en eks-Jugoslavio: neniu bonpensa homo povas toleri kaj pravigi tiajn hororojn, amasbuĉadojn kaj 'etnajn purigadojn' nome de iu ajn ideologio. Tamen ne estus juste kulpigi egalmaniere unujn kaj aliajn, dirante, ke ĉio estas konsekvenco de la propra voremo kaj agresemo karakterizaj je ĉiu naciismo. Staras ekster dubo, ke iuj pli respondecas ol aliaj; kaj tio ŝajnas tre komuna sento en la internacia publika opinio.

Malgraŭ la iom ĥaosa prezentado, mi provis skizi, ke naciismo, kiel liberiga projekto por subpremataj etnaj minoritatoj -tiom pli en kio koncernas min kiel eŭskonneniel estas sinonimo de reakcio, fanatikismo aŭ ŝovinismo sed, ke male ĝi konsistigas progreseman kaj eĉ revolucian ideologion -en ĉi tempoj tiel mankaj je ili...- celantan ne nur propran bonfarton, sed vere internacian harmonion surbaze de la plej skrupula respekto al la rajtoj de ĉiuj etaj etnoj en la mondo. Kompreneble, mi ne aludas al tiu egoisma kaj imperieca naciismo, kiu ofte karakterizas la potencajn ŝtatojn (krom Hispanio, venas nun en mian kapon Francio, kiu distingiĝis dum jarcentoj kiel paradigmo de la plej bastarda centralizo kaj asimilemo). Jam en la fino, mi ekkonscias, ke grava aspekto, pri kiu mi ne montriĝas speciale entuziasma, nevole eskapis el mia (mal)atento: temas pri la futuro de Eŭropo en ĝiaj multaj variantoj kaj ties eventuala influo sur nian temon. Sed tial, ke mi ne estas divenisto, kaj krome ne volas plu tedi vin per mia ŝablona kaj apologia babilaĵo, mi lasos tion por alia okazo.

***JOXEMARI SARASUA***

# Kaj... mi ne laciĝas

Efektive, amiko Joxemari, ke vi ne malkovras la Mediteraneon, kiam vi priskribas la antikvan teorion difinantan la naciismon laŭ la versio de pasintaj jarcentoj, sed legi, ke tiu estas via kredo, kvazaŭ la tempo ne estus forpasinta kaj, sekve, la socio ne evoluinta, tio ŝajnas tute nekredebla, se dirita de juna homo kun pretendoj progresemaj.

...Ke mia idearo estas utopia, ĉar mi pensas, ke nia batalo, la batalo de progresemaj laboristoj, konsistas en ĉiutaga konkero de parceloj da libero kaj demokratio; ke politiko solidara devas anstataŭi tiun inter nacioj, kutime funkciantan sub impulsoj de la plej forta; ke landlimoj devas malaperi kiel esprimo de divido, diskriminacio kaj apartigo de homoj (ja ili estas komenciĝo de abomena rasismo); ke ni devas paroli nur unu lingvon, Esperanton, krom la propra; ke estus dezirinda strebi al komuna politiko socia por ĉiuj laboristoj de la Eŭropa Komunumo antaŭ la kreskanta agresemo de la kapitalismaj multnaciaj entreprenoj; ke naciismo, kiam ĝi radikaliĝas ĝi murdas, detruas kaj disvastigas malamon kaj morton, kiel montras multnombraj ekzemploj en Afriko, en Oriento, eks-Jugoslavio, ktp. Jen kiel mi utopiis...

Kaj mi ne tion negas, vi ja legis tion en miaj artikoloj, kaj presitaj restas miaj diroj: la realo pri kruelaj agoj fare de naciistoj, kiel mi indikas en tiuj lastaj paragrafoj, konstatebla estas, ankaŭ de vi. Cetere, la utopiemo de miaj ideoj, de mi prezentitaj kun la impeto de 18-jarulo (laŭ via diro), ne montriĝas tiel malproksima, ĉar malapero de landlimoj en la Eŭropa Komunumo jam ni palpeblas, dum financa helpo por malriĉaj regionoj kiel signo de solidaro, planado de politiko egalrajta por ĉiuj popoloj pri sano, edukado, sociaj kaj politikaj rajtoj, ekologio, ktp. jam estas aplikataj aŭ aplikotaj.

Mi konsideras tiujn progresojn ne triumfoj de iu ajn politiko, sed evidentaj signoj de modernigo forportantaj kadukajn parcelojn de malutila naciismo, ĉar ili nuligas ŝovinismajn rivalecojn kaj egaligas popolajn rajtojn sendistinge de iu ajn el ili. Sed mi diru tuj al vi, ke tiuj paŝoj antaŭen tute ne signifas idealon mian plenumitan, ho tute ne! pri tio permesu al mi hodiaŭ ne paroli. Tio, kion mi intencas diri al vi, estas, tute simple, ke spite al viaj regresemaj ideoj, kaj eĉ al mia utopiemo, la socio evoluas, kaj ĉiutage pecoj de naciismo, en kreskanta malprestiĝo, malaperas kiel ĉifonoj ne plu taŭgaj por vesti ian ajn estonton. Do, se vi akuzis min kiel utopieman por hontigi min,

vi eraris, ĉar fierigas min pensi kaj senti tiel: ja la vivo sen certa revemo perdas sian tutan logon.

Sed, malgraŭ niaj malsamaj kredoj, mi konstatas, ke ni samopinias pri unu sola punkto: via propono, ke ni tute ne perdu nian humurkapablon. Humuron, kaj ne malmultan, oni bezonas por ne perdi la trankvilon, kiam vi asertas "ke la batalo por la nacia liberigo estas nun rigardata kiel parto de la internacia proleta revolucio".

Sed pri kia proleta revolucio vi parolas? Ĉu temas pri simpla ĵonglado per vortoj, aŭ reale vi pensas, ke ekzistas ia ebla rilato inter naciismo kaj internacia proleta revolucio? Kial vi ne parolis pri la principoj de tiu mirinda socia doktrino, ĉar mi ne povas kredi, ke tiu frazo "la batalo de ĉiuj subpremataj popoloj kun celo al libero" (mi dirus al la povo), estas kompleta sintezo de via proleta ideologio?

Ĉu vi opinias, ke la popolo estas blinda kaj ne vidis tion, kio okazis/okazas, kiam atingas la nacian suverenecon certaj minoritatoj sen socia doktrino, kiel estas via kazo? Tiuj kiuj laste atingis la povon en Afriko aŭ Eŭropo per perforto, samkiel vi pretendas, ne nur ne donis liberon al siaj respektivaj popoloj, sed terure sklavigis ilin! Cetere ne forgesu, ke vi estas minoritato (17-20%), kial do vi parolas en la nomo de la tuta vaska popolo? Moderigu vian parolon, kamarado, mi petas vin, kaj ne halucinu nin pri proleta revolucio tute ne ekzistanta! Se vi devus regi hodiaŭ la vaskan popolon, kion vi farus per via perforta naciismo por la vaska popolo?, ĉu nutri ĝin per via "teoria internacia solidaro"? Kiel vi, sen sociaj principoj garantios la liberojn de via popolo?. Sendube, por vi popollibero kaj demokratio signifas nenion, ja neniu devas forgesi ke via sistemo ne uzas konvinkon, sed perforton!

Amiko Joxemari, malgraŭ ĉio dirita, mi volas kredi je via honesteco kaj opinias, ke nur la lasta parto de via diskurso estas iom pli inteligenta: certe la senĉese ŝanĝiĝanta mondo postulas de vi, la pensemaj homoj de via movado, ŝanĝi vian strategion. Se vi ne volas, ke ĉiu homo, inkluzive de la progresemaj hispanaj laboristoj, vidu en ĉiu stratangulo "sangosoifantajn naciistojn", (laŭ via diro), ŝanĝu vian agadmetodon, montru per la parolo kaj per via agado, ke vi pravas, ke vi ne estas fanatikuloj, ke vi scias dialogi. Kaj mi diras tion al vi ne laŭ nivelo registara, sed kiel simpla civitano. Vi perfekte scias, ke tio eblas nun. Mia sola konsilo al vi, (se vi tion al mi permesas), estas, ke vi parolu multe pli pri libero kaj iomete malpli pri etno kaj nacio. Pensu, ke Hispanio estas vera galimatio pri etnoj, kaj enprofundiĝi en la purecon de ĉiu el ili enkondukus nin al seneliraj solvoj kaj nekontentigaj rezultoj. Gravas libero ĉiam, etno ne transcendas: homo egalas al alia homo, sen distingo de raso, koloro, lingvo aŭ io alia... aŭ, ĉu eble vi kredas en la pureco kaj supereco de via raso?

Joxemari, plaĉe "Kajeroj el la Sudo" akceptos viajn artikolojn, se ili nur staras ekster la kadro de ĉi tiu kvazaŭĉeno senfina de tedaj replikoj kaj kontraŭreplikoj. Private mi respondos al vi ĉiam, se vi tion deziras, kaj malgraŭ mia densa okupiĝo. Sed ne forgesu, ke, kiam temas pri homaj liberoj kaj humanismaj ideoj, tiam, efektive, mi ne laciĝas...

*Antonio Marco Botella*

---

# Priekologiaj zorgoj



Kiel verdigi la verdulojn? aŭ kiel esperantigi ĉiujn ekologojn? Jen tuja celo de la esperantistoj.

Kial? Por prepari nin por venontaj internaciaj ekologiaj konferencoj kaj igi ilin pli efikaj kaj sukcesaj ol tiuj jam okazintaj.

La "Kunsido en la pinto" kaj la "Globa Forumo" de la Internacia Ekologia Konferenco okazintaj en junio 1992 en Rio- de-Ĵanejro, nomita EKO-92, estis esprimo plej kompleta de Babela konfuzo: svarmis lingvoj, sed la interkompreno estis ja sub nulo.

En la nomo de UEA kaj per la helpo de la loka Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro (AERĴ) ni, brazilaj esperantistoj, starigis tie, proksime de la konferencejo, esperantan budon por propagandi nian aferon: ni montris librojn, revuojn kaj propagandilojn kaj samtempe disdonis informojn en pluraj lingvoj por kontribui iamaniere al la sukceso de la konferenco. En tiu tasko grupo de lokaj esperantistoj parolantaj dek lingvojn ĉeestis senlace tie informante la publikon kaj strebante por plifaciligi la interkomprenon de tiom da homoj venintaj el kvin kontinentoj por tiel iamaniere kontribui al la sukceso de la konferenco.

En apuda granda hotelo okazis kunveno de membroj de ne-registaraj organizaĵoj en la "Globa Forumo". La tri oficialaj lingvoj estis la portugala,

la hispana kaj la angla, sed reale la plej uzata estis la angla. Malgraŭ ĉiuj niaj klopodoj, la rezulto estis tute nekontentiga, kaj oftaj plendoj kontraŭ lingva diskriminacio abundis: multaj partoprenantoj volis ĉeesti en certaj prelegoj aŭ interveni en interesaj debatoj, sed la lingvo estis granda baro por plej granda parto el la ĉeestantoj, ĉar ne ĉiam la volo kaj scio de la aŭskultanto koincidis kun la lingvo de la preleganto.

Ursula Gratappaglia, delegitino de UEA ĉe Alto Paraiso, venis helpi nin en nia informa tasko kaj profitis tiun okazon kaj konfuzon por proklami en tiuj kunvenoj de neregistaraj organizaĵoj, ke la solvo de la problemo sidas sendube en la uzo de la internacia lingvo Esperanto. Kaj ŝi proponis, inter aplaŭdoj, ke en venontaj kunvenoj ekologoj lernu nian lingvon kaj uzu ĝin estonte en similaj kazoj. Tio konvinkis ĉiujn, ekologojn kaj esperantistojn, pri la bezono starigi komunan planon konsistantan precipe el jenaj punktoj:

1) Publikigi artikolojn en ĉiuj internaciaj esperantistaj revuoj kaj en la naciaj ĵurnaloj kun la celo altiri ekologojn en niajn vicojn surbaze de kunlaboro.

2) Organizi Esperantajn kursojn en niaj rondoj aŭ en ekologiismaj centroj specife nur por ekologiistoj. Tiuj kursoj, gvidataj prefere de ekologiisto-esperantisto, devus prepari estontajn delegitojn al venontaj konferencoj, informante ilin pri la absoluta bezono uzi nur nian lingvon por eviti novajn fiaskojn kiel tiu pri interkompreno okazinta en Rio.

3) Organizi kampanjon en ĉiu lando fare de la esperantistaj asocioj pri la grandaj problemoj ekologiaj en la mondo kaj per ĝi alproksimigi la ekologojn al la esperantistoj kaj reciproke.

4) La venonta internacia konferenco kaj "Kunsido en la pinto" pri ekologiaj problemoj en la mondo, tre probable okazos en Turkio en 1996, do dezirinde estas, ke ekologiistoj kaj esperantistoj sin preparu por tiu evento kaj pretigu kiel eble plej rapide nian reciprokan kunlaboradon por iel kontribui al la grava tasko savi nian planedon.

Do, esperantistoj karaj, agu ekde nun. La estonto komenciĝas hodiaŭ. Savi nian patrinon TERO ne estas ja bagatelo!

*May Bijleveld*

---

Gek-doj: Ni atentigas vin pri la pago de abonoj kaj kotizoj!

# Ekologio


Kaj…vespero nedifina,
kiam fantazi-anĝeloj
volos tion,
venos mi, la senso vigla,
kaj proklamos arbarleĝojn,
purmedion…
Distribuos ni jubilaj
fratajn homvalorajn donojn,
solidaron.
Kaj kun senc' ekologia
ni disdonos purajn hortojn,
vegetaĵojn
kaj natur-rimedojn simplajn:
sunon, juston, poezion,
kaj respekton
al la terestaĵoj vivaj:
homoj, bestoj, plantoj, ĉio…
en libero!

*Emilio Gastón Sanz*

La aŭtoro de tiu ĉi poemo estas nepo de la samnoma eminentulo Emilio Gastón Ugarte, iama fondinto de la Aragona Societo "Frateco" de Zaragozo en 1908.

Emilio Gastón Sanz, estis dum la lastaj kvar jaroj la Popoldefendanto de Aragono kaj, evidente, li ankaŭ estas: advokato, ekologo, poeto kaj…esperantisto.

*La Redakcio*



# KIEL KABE KONFUZIĜIS PRI LA UZO DE "de" KAJ "per".

*Enkonduko*

*La provo rehabiliti KABE la renegaton fare de iu Gonçalo NEVES, estas destinita al fiasko(1). Mi jam demonstris lian leksikografian nekompetentecon, analizante misajn kaj mankhavajn difinojn en lia Vortaro de Esperanto (2). Antaŭ nelonge mi entreprenis esploron pri la uzo de prepozicioj en lia Esperanta traduko de la romano La Faraono verkita de Bolesław Prus. La rezultoj montras ankoraŭfoje, ke KABE ne estis tiel eminenta lingva majstro, kiel kelkaj homoj volas kredigi. Por la celo de tiu studaĵo, mi limigas min al pritrakto de la uzo de "de" kaj "per" kun la pasivaj participoj "kovrita" kaj "ĉirkaŭita".*

*La Lingva Respondo de Zamenhof*

*Laŭ Lingva Respondo 132 (sesa eldono), d-ro Zamenhof klarigas, ke "per" estas uzebla post pasiva verbformo nur, se ĝi troviĝas antaŭ vorto, kiu esprimas ne la aganton mem sed rimedon uzatan de iu alia aganto. Ne bona estas la esprimo "la tero estas kovrita per neĝo", ĉar tie ĉi ne iu kovras la teron per neĝo, sed la neĝo mem estas la aginto. Pro tio devas stari antaŭ ĝi la prepozicio "de". La ĝustan uzon de "per" ilustras jena frazo: "La tablo estas kovrita de la servanto per tapiŝo". Se oni aktivigas pasivan frazon, tiam la vorto, antaŭ kiu troviĝas "de", fariĝas la subjekto de la frazo: "La servanto kovras la tablon per tapiŝo".*

*Ĉu KABE sciis apliki la zamenhofan regulon?*

*Sajnas, ke ne. Trakribrinte la tri volumojn de La Faraono, mi rikoltis pli ol kvindekon de frazoj kun la pasivaj participoj "kovrita" kaj "ĉirkaŭita", kaj mi dividis ilin en du grupojn surbaze de uzo de la prepozicioj "de" kaj "per". Tuj frapis al mi en la okulojn la nekonsekvenco de la lingvouzo de KABE. En similaj semantikaj kontekstoj li uzis jen "de" jen "per" kvazaŭ li estus ĵetinta moneron: averso -"de"; reverso -"per",! Jen kelkaj ekzemploj.*

| *DE* | *PER* |
| --- | --- |
| *"...oni vidas la murojn de ĉiuj ĉambroj, kovritajn de preĝoj kaj* | *"Tuta arbaro de potencaj kolonoj, kovritaj de la* |

| DE | PER |
|---|---|
| pentraĵoj". | planko ĝis la supro per pentraĵoj". |
| "...la tero estis kovrita de verdaĵo kaj floroj". | "...la tero baldaŭ kovriĝis per smaralda verdaĵo"... |
| Ĉiaj kvar- eĉ kvinetaĝaj domoj, de la fundamento ĝis la supro estis kovritaj de mozaik..." | "Tra ĉi tiu pordego la popolo eniradis en la korton, ĉirkaŭantan la templon de Oziriso kaj kovritan per ŝtona planko". |
| "La ĥaldeano... eltiris oran medalon, kovritan de misteraj signoj". | "...li prenis...bastonon, kovritan per misteraj signoj"... |
| "Tio estis kvarangula ĉambro, ĉirkaŭita de kolonoj". | "En la sama grandega ĉambrego, ĉirkaŭita per kolonoj...kunvenis hodiaŭ la altranguloj". |
| "...oni eniradis en la korton ĉirkaŭitan de portikoj"... | "...ĉiu (konstruaĵo) estis ĉirkaŭita per densa kolonaro". |
| "...en la matura aĝo ĉirkaŭita de l' danĝeroj, kiel la baleno de la profundaj akvoj". | "Mi estas sensperta, ĉirkaŭita per reto de intrigoj"... |
| "Kelkfoje okazis, ke dinastio falis, kaj la ĉapon de faraonoj -<u>klaff</u>, ĉirkaŭitan de serpento, surmetis pastro". | "Baldaŭ Herhor, sur ora plado, donis al la sinjoro blankan kaj ruĝan kronon, ĉirkaŭitan per ora serpento. |

## Konkludo

*Nelonge antaŭ ol KABE kabeis, li estis intervjuita kaj tiam li elbuŝigis sian faman eldiron: la esperantistoj lernu Esperanton! (4). Nu, post rigardo de lia fuŝtradukado de kelkaj frazoj en La Faraono, lia konsilo tuŝas ankaŭ lin!*

## Notoj


1. Bernard GOLDEN. Nine omaĝu al apostato! Monato.1989 Oktbro;20
   Gonçalo NEVES. La tiraljoro Golden. Monato. 1990 Februaro: 4.
   Bernard GOLDEN. Malfruiĝinta Plendo. Monato.1992 Jul.: 7.

2. *Bernard GOLDEN. Kelkaj kritikaj rimarkoj pri la vortaro de KABE. Nia Bulteno. 1990 septembro-oktobro; 50: 10, 12.*
*Bernard GOLDEN. Aùtodafeo por la vortaro de KABE! Nia Bulteno. 1991 novembro-decembro; 54: 18-19.*
3. *Bolesław PRUS. La Faraono. El la pola lingvo tradukis Kazimiers Bein, Kabe. 3 volumoj. Paris: Hachette; 1907. 194+238+198 p.*
4. *Du fantaziaj rakontoj temantaj pri la kialoj de la kabeado de KABE estas la sekvaj.*
*Bernard GOLDEN. La faraona malbeno el la antikva Egiptujo/Egiptio. La kancerkliniko. 1990 januar., febr., marto; 53:18-19.*
*Bernard GOLDEN. Kial KABE fariĝis renegato (ĉapitro el la ukronia historio de la Esperanto-Movado). Aperonta.*

*Bernard GOLDEN*

---

# KOTIZTABELO POR 1994

| | |
|---|---|
| Baża jarkotizo por SAT-membro . . . . . . . . . | 1.500,- Ptoj |
| Jarabono "Sennaciulo" . . . . . . . . . . . . . | 1.800,- " |
| Abono "Sennacieca Revuo" . . . . . . . . . . . | 450,- " |
| Jarabono "Kajeroj el la Sudo" . . . . . . . . . | 800,- " |
| Membreco de HALE kun revuo por SAT-membroj... | 500,- " |
| Jarabono "Kajeroj" ne hispanoj . . . . . . . | 50,- FF.aù e/v |

Niaj k-doj devas atenti ĉi-jare jenajn rimarkojn:
1. Pagante sian kotizon, SAT-membro deziranta ricevi la asocian organon "Sennaciulo" devas krome pagi ties abonon.
2. Ĉiuj membroj escepte de la familianoj, aútomate ricevas la la jaran kajeron "Sennacieca Revuo" sen plia abonpago.
3. Emeritoj, senlaboruloj, gejunuloj (ĝis 25-a jaro) pagas la duonon de la baza kotizo.

NOVA SAT-Peranto por Hispanio kaj KASISTO de HALE:

Nicolas GIL CARBALLO; Apartado 305, 24080-LEON. (Hispanio).

Sendo de kotizoj kaj abonoj al la indikita k-do per poŝto kaj sen aldona kosto ekde ĉiu hispana poŝta oficejo al:

"Cartilla Postal n-ro 29-85.039.477.

Konsilinde estas anonci al nia k-do GIL CARBALLO la sendon de la mono perletere.

# LA MOVADO EN KAJ EKSTER IBERIO



Santiago de Compostela

En tiu ĉi galega urbo okazis Mondkongreso de PEN-Centroj, de la 6a ĝis la 12a de septembro,dum kies lasta sesio oni agnoskis Esperanton kiel literaturan lingvon.

Pli ol 300 verkistoj el la tuta mondo, reprezentante 69 PEN-Centroj, partoprenis en la Konferenco, en kiu oni debatis pri la situacio de verkistoj de minoritataj lingvoj. Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer reprezentis la sekcion PEN-Esperanto.

Inter la invititoj troviĝis la Nobelpremiito Camilo José Cela, la mortminacata Salman Rushdie, aùtoro de"Satanaj Versoj", Jorge Amado, Nelida Piñón, k.a.

La asembleo de delegitoj subskribis la Deklaron de Santiago de Compostela, kiu laùdas la procezon pri revivigo de la galegaj lingvo kaj kulturo, kaj inkludas peton al la galegaj aùtoritatoj "konsideri la eblecon organizi aranĝojn por diskonigi sian modelon, kiu povus esti multvalora en la nuntempa minacata mondo".

*****

León.

En la sidejo de sindikato CNT de tiu ĉi urbo komenciĝis kurso de Esperanto, kiun gvidas nia k-do Nikolao Gil Carballo.

Ni atentigas niajn HALE-membrojn, ke nia k-do Nikolao estas la nova SAT-peranto en Hispanio.

*****

Zaragozo

Organizitaj de la Esperanta Societo "Frateco" de Aragono komenciĝis du Esperanto-kursoj. Unu, por esperantistoj, kiuj jam scipovas la lingvon, okazanta en la propra sidejo de la asocio. Alia, por komencantoj, en la Instituto de Idiomoj de la Zaragoza Universitato, kiun gvidas nia k-do Lorenzo Noguero Sarasa.

*****

MALAGO

HALE anoncas al siaj membroj kaj simpatiantoj, ke la venonta Ĝenerala Kunveno de la asocio okazos en Julio-1994 en tiu andaluza urbo, paralele kun la HEF-kongreso. Oni rekomendas al nia anaro partopreni ĝin, ĉar gravaj problemoj de la asocio postulas solvojn. Ni invitas al niaj eksterlandaj k-doj pasigi kun ni tiujn belajn tagojn en unu el la lokoj plej agrable mirindaj de nia lando.

La venonta SAT-kongreso okazos en STRAZNICE (Ĉeĥa Respubliko) de la 16a ĝis la 23a de julio 1994. Tiu urbo, unu el la plej gravaj kulturaj kaj historiaj centroj de Suda Moravio, nuntempe estas ofte nomata perlo de la moravia folkloro. Ni esperas, ke multaj HALE-anoj partoprenos tiun kongreson.

*****

Sant Cugat del Vallès

De la 9a ĝis la 16a de oktobro okazis en tiu urbeto apud Barcelono Internacia Kultura kaj Turisma Semajno, kun partopreno ne nur de hispanoj, sed ankaŭ de reprezentantoj el diversaj landoj.

En la solena malfermo de tiu interesa evento ĉeestis la konsilanto pri kulturo de la Sant Cugat-urbestraro, kaj la postan festan paroladon faris la kunredaktoro de "KAJEROJ", nia k-do Miguel Fernández Martín, kiu entuziasmigis la ĉeestantaron per recitado de poemoj de Garcia Lorca kaj interesa rakonto pri la viveroj de la granada poeto. Donis brilon specialan al la kunveno la prezentado de la verko "Poemo de Utnoa" fare de la propra aŭtoro, Abel Montagut, kun enkonduko kaj recitado de pecoj de la verko fare de Miguel Fernández.

La programo estis sufiĉe interesa kaj varia: dum la tuta semajno gvidis kurson de Esperanto per rekta metodo s-ino Carla de Lorenzi. Prelegis Luis Hernández Izal, Salvador Aragay, Giordano Moya, Luis Serrano, Martí Guerrero, Milan Sudec...

Du koncertoj, unu de "Barcelona Gitara Trio" surbaze de klasika gitara muziko, kaj alia de Andaluza Ensemblo kun kanto kaj recitado de tipa andaluza muziko, faris la plezuron de la kunvenantoj.

Vizitoj al la artaj kaj historiaj monumentoj de Barcelono kaj al la kulturaj Centroj de Sant Cugat, kune kun ekskursoj al Sant Pau de l' Ordal, Sabadell kaj Montserrat konsistigis la distran kaj turisman parton de la programo.

Disvolviĝis la plej granda parto de la programo en la Centro Borja de Sant Cugat del Vallès, kiu, plian fojon montriĝis trafa rendevuejo por kulturaj aranĝoj.

*****

Valladolid

Jus eldonitaj en Hispanio, furoras nun jenaj Esperantaj verkoj: "Ibere libere", verkita de junaj poetoj, la plej laŭreataj nun en Esperantio; "Poemo de Utnoa", de Abel Montagut; "Sferoj-8, plej prestiĝa verko pri fantasto aperanta ĉiujare kaj eldonita de M. Gutiérrez Adúriz; kaj "Tirano Banderas", de Ramón María del Valle-Inclán, eble la plej bona romano de la nuna jarcento, trad. de F. de Diego. Nun, Libro-Servo de HEF, Apartado 119, ES-47080-VALLADOLID ofertas tiujn librojn al vi je moderaj prezoj.

---



# RAKONTOJ EN UNU MINUTO

EBRIA HERBO

La najbaroj susuras, ke mi frenezas. Ili diras, ke ĉiunokte, kiam homoj kaj dombestoj pli aŭ malpli dormas, mi eliras al la arbareto kaj promenas, promenadas ĝis la rivero, kaj tie mi kuŝas sur la bordo, aŭskultas la riverakvon, rigardas la stelojn, karesas la herbon kaj fine komencas zumi, kanti kaj hurli. Tiam, la herbo komencas moviĝi, unue -onde; poste -ronde; fine -kirle. La herbo kreskas kaj malkreskas sovaĝe en danco, kiu saltigas min inter ĉielo kaj rivero.

Sed mi pledas por mia senkulpeco. La najbaroj akuzas min malprave, jam mi ne estas freneza. Verdire, nur la herbo kulpas, ke ĝi entuziasmas ĉe mia kantado, ke ĝi kondutas sovaĝe kaj malsobre. Ebria herbo...!!

MATURA FRUKTO

Estas aŭtuno kaj la somero alportis rikolton, espereble sufiĉan por la vintro. Mi komencas saŭdadi la ĝojajn momentojn kun la kompanoj, kiel ni

distriĝis kaj kunĝuadis en raraj okazoj inter du labortagoj. Foje, ni ŝtelis jen kaj jen unu horon de dormado. Sed kia kompenso estis dividi, se ne pli, almenaŭ la akompanon de proksimaj animoj! Mi diskretu tamen pri saŭdado.

Aliflanke, mi ne bedaŭras la amaron de perfidaj kunuloj, perditaj amikoj, neeblaj amatoj. Rememoroj dolĉamaraj... Tio konsistigas ankaŭ la maturan frukton, kiun mi rikoltas nun. Estas aŭtuno de mia vivo.

BALDAŬ PLUVOS

Baldaŭ pluvos, kaj la trista realismo de mia amato denove pravos, ke papilioj ne transvivas someron. Feliĉe, ĉar papilioj ne eltenus aŭtunon. Nek eltenus la perfidan nudiĝon de arboj. Ekstremoj koincidas, avoj reinfaniĝas, sed aŭguroj foje bonas, foje mavas. Hodiaŭ, mi vidis papilion sur falinta arbofolio. Jen mavaŭgura signo de erarvaginta misordo. Baldaŭ pluvos.

ERARO

Mi havas konvinkon, ke io misfunkcias. Kio ĝi estas? Volonte mi dirus, se mi nur scius. Io misfunkcias kaj tial herbo ebrias, fruktoj maturiĝas kaj baldaŭ pluvos. La tempo pasas, aŭ tiel ŝajnas. Labirinte kirliĝas la mondo ĉirkaŭ mi, kaj mi sukcesas nur helpokrii!

Ne sukcesas, nur sufokiĝas kaj dronas en sin-forgeso.

Mia lasta penso estas: Eraro!

R.F. Albert Reyna

---

# ADMINISTRA ANGULO

Pagis sian respektivan ĉi-jaran abonon jenaj k-doj:

| | | |
|---|---|---|
| Fernando Costa (Portugalio) . . . . . . . . . . | 800,- | Ptoj |
| Emilio Pérez Gimeno . . . . . . . . . . . . | 800,- | " |
| Noemi Huerga Pérez . . . . . . . . . . . . | 800, | " |
| Ruperto Vicente donacas . . . . . . . . . . | 25.000, | " |
| Entute sumas | 27.400,- | " |

Ni tutkore dankas al niaj gek-doj kiuj frue pagas abonojn kaj kotizojn, ĉar tio multe helpas la administradon. Dankon!

*Kajeroj*
*— el la Sudo*

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Sir, Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º.
50002 - Zaragoza (Hispanio)

Depósito legal: Z - 2398 - 88
Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas, S.A.